

## Spertoj sur la vojo al terminologia prilaborado de la forstfaka lingvo

K.-H. SIMON & I. ULLRICH

### Enkonduko

Nia priskribo de la vojo al terminologia prilaborado celas unue la interkomprenigon inter kunlaborantoj de la "Lexicon silvestre - projekto". Due ni volas komuniki niajn spertojn al aliaj interesatoj kaj fakuloj, kiuj okupiĝas kaj okupiĝos pri terminologia laboro. Ni opinias, ke niaj propraspertaj rimarkoj havas signifon speciale por tiuspecaj personoj, kvankam ekde 1997 ekzistas valora broŝuro verkita de Heidi SUONUUTI (1997), kiun Wera BLANKE kaj Sabine FIEDLER 1998 tradukis, prilaboris kaj disponigis al la esperantistaro sub la nomo "Terminologia gvidilo". Esencajn rezultojn de la verko de Eugen WÜSTER kaj Ernest DREZEN pri terminologio nun povas pli facile uzi ĉiu esperantisto, laboranta sur terminologia kampo. En la sekvaj ses ĉapitroj ni resumas kronologie la ĝisnunan vojon kaj prezentas praktikajn spertojn, rezultantajn el la akiritaj scioj dum praktika agado.

### La unuaj paŝoj post 1981

Kiam en la jaro 1981 dum la 1-a konferenco "Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tehniko" en Zilina (CSSR) interkonatiĝis la forstistoj Milan SVOBODA kaj Karl-Hermann SIMON, ili plendis pri la manko de Esperanto-lingva vortaro pri forstaj fakoj. S-ro Svoboda instigis, ke en Eberswalde (Ebersvaldo) oni komencu eldoni slipojn kun nocioj cele de komuna el-laborado de forstfaka vortaro. Do, ekestis unue la penso pri komuna agado de interesataj forstistoj kaj due la intenco eliri de nocioj kaj ne de terminoj. Tio estis fundamenta paŝo en la ĝustan direkton.

La sekva paŝo estis la provo kontaktiĝi kun ĉiuj interesataj forstistoj-esperantistoj. Pri tio helpis konataj esperantistoj kiel d-ro Blanke (Germanio), s-ro Eichholz (Kanado), d-ro Kavka (Ĉeĥio) kaj profesoro Neergaard (Danlando), kaj ankaŭ alvokoj en revuoj.

En oktobro 1981 formiĝis Scienca kaj Teknika Komisiono kadre de Esperanto-Asocio en la tiama Germana Demokratia Respubliko (GDR) al kiu apartenis ankaŭ tri geforstistoj el Eberswalde. La interkompreniĝo kun aliaj esperantistoj pri terminologiaj problemoj helpis realigi la komencajn paŝojn.

### La dua periodo kun "Forstista Informilo" ekde 1982

Jam en la jaro 1981 proponis s-ro Maserov (Bulgario) "eldoni malgrandan bultenon por informadi kaj organize ligi la kolegojn". Ĉar ankaŭ aliaj kolegoj subtenis similan ideon, ni preparis tiuspecan bultenon. La 30an de septembro 1982 ni eldonis la unuan numeron de "Forstista Informilo" (FI). Ĝi enhavis la nomojn de 13 geforstistoj, kiuj deklaris sin pretaj kunlabori en terminologia laboro pri forstfakaj aferoj. Ni akcentis la ses tezojn pri terminologia laboro, kiuj 1982 estis publikigitaj de Wera DEHLER (nun Wera BLANKE).

De komenco estis klare, ke la rezulto estu plurlingva vortaro, kiu servu ne nur al esperantistoj. Tial estis logike uzi kiel bazon la de WECK (1966) kompilitan kvinlingvan forstfakan vortaron. Ni do starigis al ni la taskon ellabori difinojn por elektitaj 2 ĝis 3 miloj da terminoj kaj trovi la adekvatajn terminojn en pluraj lingvoj. Pli malfrue ni ekkonis, ke ni antaŭeniru nur laŭpaŝe per unu milo da nocioj.

La sinsekvo ekde la prilaborado de nocioj estu plenumota laŭ graveco de la nocioj. Tiel la rezulto ekde la komenco estus tuj uzebla por uzantoj. La difinoj estu koncizaj helpe de la utiligado de jam prilaboritaj nocioj per intermetitaj atentigiloj.

Antaŭ la tri geforstistoj el Eberswalde staris la problemo de la teknika realigo. La estraro de la "Instituto pri Forstscienco Ebersvaldo" reagis sur nia intenco tre rezerviĝeme pro la konsekvenco de nedeziritaj internaciaj kontaktoj por subalternaj institutanoj. Spite, sub la tegmento de la influhava "Ĉambro de Tekniko" en GDR kaj ĝiaj laborejaj sekcioj ni sukcesis uzi la komputorojn de la Ebersvaldaj sciencaj institutoj. Tiam ankoraŭ dominis la tekniko per la trukarta sistemo respektive trubendlegiloj. Ĉar tiam la disponeblaj komputoroj nur ebligis tajpi la literojn de la angla alfabeto ni verkis kodon. Laŭ tiu kodo la diversaj diakritaj signoj kaj specialaj literoj estis indikitaj, unusignife fiksataj en la komputoroj. Cetere, ĝis hodiaŭ ni uzas tiun kodon en datenbankoj.

Tiam ni rezignis pri indiko de difinoj por nocioj aŭ terminoj kaj pri iu numero de Universala Decimale Klasifiko aŭ de alia sistema envicigo. Neniu povis aŭ volis preni sur sin tiun malfacilan taskon, kiu fakte estu solvenda *antaŭ* la diskuto pri Esperanto-formo de iu termino. Do, ni komencis la terminologian laboron, por tiel diri, farante la duan paŝon antaŭ la



unua. Ĉar ni opiniis, ke estus pli granda eraro ne komenci la komunan terminologian agadon - tiel perdi tempon kaj perdi la jam pretajn kunlaborantojn. Plua atendado certe estus kaŭzinta disreviĝon inter kelkaj Esperanto-forstistoj, kiuj vane atendis terminologian laboron jam multajn jarojn.

Grava bazo de nia laboro estis kaj ankoraŭ estas la grandega Ebersvalda forstfaka biblioteko. Donacoj de geesperantistoj kiel *Pachter, Moudry* kaj *Kovalěva* helpis fermi la plej gravajn breĉojn. En la jaro 1982 ni ankaŭ komencis eldoni "Bibliografion de arbarmastrumada literaturo". Ĝi entenas ĉiujn verkojn, kiujn nia terminologia laboro necesas aŭ kiuj traktas esperantlingve forstmastrumadajn aferojn. Dum la tempo de la "malvarma milito", la tradicia "Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER) en *Leipzig* estis grava okazintaĵo, dum kiu esperantistoj el la diversaj blokoj - do ankaŭ ni, la forstistoj - povis transsalti la ŝtatajn obstaklojn kaj povis senpere diskuti proprajn problemojn.

En la unua jaro ni kolektis la Esperanto-terminojn pri nocioj sur slipoj, kiujn ni sendis al unuopaj kunlaborantoj. Ili resendis la slipojn kun siaj enskribitaj proponoj. Post unu jaro ni ekkonis, ke tia decido de plimulto pri la fiksado de terminoj ne rezultigas kontentigan solvon. Ekde la jaro 1983 "Malgranda Terminologia Komisiono" (MTK) - pli malfrue "Terminologia Komisiono de IFRE" (TK) - elektas la terminojn, kiuj estas eldonataj kiel proponoj de IFRE (vd. sube).

Dum internaciaj kunvenoj de esperantistoj la forstistoj pli kaj pli formis propran organizon, kiu hodiaŭ havas la nomon "Internacia Forstista Rondo Esperantlingva" (IFRE). Ĝia ĉefa tasko estis kaj estas la terminologia laboro kaj uzado de la faklingvo en artikoloj, prelegoj, interparoladoj, kaj por tradukoj el la forstfaka literaturo. Tiel praktike konfirmis sin la jam ellaboritaj terminoj.

Ekde la komenco de nia terminologia laboro ni daŭre testadis *kaj* la kvalitajn *kaj* la funkciajn ecojn de la proponitaj terminoj. La aŭtoroj ĝis nun publikigis pli ol 20 fakajn artikolojn kaj tradukojn de fakaj artikoloj. Tiel ne nur faka scio estas transdonita internacie, sed, antaŭ ĉio, ni ricevis gravajn ekkonojn por la leksika parto de nia terminologia laboro.

### La tria periodo ekde la kunveno en *Brno* en 1984

Ni konsideris kiel gravan laborprincipon regule raporti pri la atingitaj celoj al la IFREanoj. Tiel ni kunsidis en aŭgusto 1984 en *Brno*, kie s-ro *Ullrich* raportis pri la finlaborado de sia 40-paĝa Esperantlingva artikolo pri forstarangado en GDR. La TK povis prezenti la unuan centon da pri-laboritaj nocioj. La TKanoj klasis la proponojn de la kunlaborantoj en ses kvalitoŝtupojn kaj poste oni elektis la plej taŭgajn. Ĉe propono de novaj vortradikoj oni akceptis eventualan sinretenon. TK proponis la uzadon de

novaj vortradikoj nur tiam, kiam estis bezonata pli alta trafeco aŭ por eviti longajn parafrazojn (certe sub garantio, ke la lingvo restu elasta kaj dinamika ankaŭ por derivitaj terminoj).

Ĝis la jaro 1985 nur geesperantistoj partoprenis en terminologia laboro. Ĉar ni ne limigis niajn laborojn sole je Esperanto sed kolektis ankaŭ alilingvajn terminojn, estis logike, ke ni komencis inkludi ankaŭ geforstistojn kiuj ne scipovas Esperanton. Tiel ŝanĝis iom post iom la pezo en nia laboro. Por la faklingvo de aliaj etnolingvoj ni ja ne plenumas terminologian laboron en vera senco. Por tiuj lingvoj ni plenumas (per la kolektado de ekzistantaj terminoj kaj la difino de nocioj) nur antaŭlaboron por pli malfrua terminologia laboro. Terminologia laboro ja celas formi raciajn, sistematikajn terminojn. Post limigo de la fako, terminologia laboro postulas la starigon de nociosistemoj kaj difinoj de nocioj. Tio estas tasko de internaciaj komisionoj. Nur ĉar rezultoj de tia laboro apenaŭ ekzistas, ni mem devis prepari difinojn surbaze de literaturo. Niaj difinoj tial nur povas havi provizoran karakteron. Tamen, ni esperantistoj ne volas atendi la rezulton de tiuspeca estonta laboro. Nia planlingvo postkuru ne pli longe malantaŭ la ĝenerala evoluo.

Tial estis tre meritplena afero, ke la ĉefia Esperanto-Asocio aranĝis 1986 terminologian kurson, kiu sciigis bazajn konojn pri terminologia scienco kaj instigis nin disvastigi nian laboron. En la postaj jaroj la nombro de niaj kunlaborantoj kreskis al pli ol cent. Kelkaj de la kunlaborantoj havis pliajn helpantojn, kiujn ni ofte eĉ ne konas laŭnome.

### La kvara periodo post la jubilea Universala Kongreso en Varsovio en 1987

Dum la UK en 1987 kelkaj IFREanoj kunvenis, interkonsiliĝis kaj kune festis. La bona etoso plifirmigis la kontaktojn. La komunikado inter la kunlaborantoj kaj Terminologia Komisiono normale okazis per slipoj por ĉiu nocio, per vortlistoj, per la Forstista Informilo (intertempe en kvar lingvoj) sed ankaŭ per personaj vizitoj. Pli kaj pli evidentiĝis, ke alianciĝo kun aliaj organizoj kaj institucioj havas reciprokan avantaĝon, ekz. kun Esperanto-organizoj, kultur-ligoj, kaj aliaj institutoj.

Por la aplikado de la Forsta Decimala Klasado fare de IFREanoj estis grave, ke s-ro *Ullrich* tradukis la novan eldonon de "*Forest Decimal Classification*" en Esperanton. Por la indiko de la deveno de difinoj kaj terminoj, ni komencis uzi majusklojn kiel mallongigojn por indikoj el literaturo kaj minusklojn por aliaj fontindikoj. Mallongigoj por lingvoj kaj landoj sekvas la respektivajn ISO-normojn.

Alia raciigo de la laboro koncernis la uzadon de diversaj signoj por la indiko de limigita uzado de certaj terminoj, kvankam ili ofte estas uzataj



kiel sinonimoj. Por ŝpari monon kaj aliflanke atingi unustilajn litertipojn en la planita vortaro, ni mem kreis proprajn literojn por ĉiuj prilaboritaj lingvoj. La informojn por respektiva nocio ni kompletigis per la "Universal Reference Numbers" (URN), se la nocio ekzistas en la renoma verko de FORD-ROBERTSON. Por la uzantoj tiu ĉi indiko povas esti valora informo. La kreskanta nombro da publikaĵoj de IFREanoj kontribuis al kreskado de ties renomo. La invito al IFREanoj, partopreni kaj prelegi en la antaŭkurso de la 8a Sennacieca Universitata Sesio (SUS) de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) en Białystok en 1990 estis laŭdo por la ĝis nun plenumita laboro.

#### La kvina periodo kun helpo de la Laboroficejo Eberswalde ekde 1991

La aliĝo de la GDR al la Federacia Respubliko Germanio ŝanĝis diversajn eksterajn kondiĉojn por la leksikon-centralo en Ebersvaldo. Post la maldungo de multaj fakuloj el iliaj laborejoj ebligis projektoj de la laboroficejo dungi kelkajn de ili. Ni sukcesis per tia propono kaj povis - inter 1991 kaj 1994 - doni laboron al sep ĝis naŭ konvenaj fakuloj. Tiel ni povis plivastigi nian laboron rilate la prilaborotajn lingvojn kaj rilate la kreadon de softvaro por nia vortara laboro. Ni povis komenci la elekton de nocioj kaj la kreadon de difinoj por la dua parto de la vortaro. Pro la nun pli granda laborkapacito ni ĉesigis provizon de la kunlaborantoj per unuopaj slipoj por la nocioj, kaj printis nun pli racie kelkajn centojn da nocioj sur senfina paperbendo.

En 1992 la kongreso de la Internacia Asocio de Forstfakaj Esplorinstitutoj (IUFRO) okazis en Berlino/Ebersvaldo. Tio estis ŝanco prezenti la rezulton de nia ĝisnuna laboro en formo de 24-lingva provekzempleron de nia forstfaka terminaro. Ekestis la demando: Kiel estu la nomo de la verko? Kiel estu la sinsekvo de la lingvoj? Kiel estu la ordigo de la nocioj?

Ni decidis, ke neniu unuopa laborlingvo estu preferata. Por la nomo de la verko kaj por ĉefaj titoloj ni tial elektis la latinan lingvon, kiun ni ne prilaboras kiel faklingvon. Ni elektis la nomon *Lexicon silvestre*. La sinsekvo de la lingvoj sekvas la numeraron de la Ĝenerala Decimale Klasado. En tiu verko la planlingvoj havas la plej malaltajn numerojn. La etnaj lingvoj sekvas. Tamen la kunigo de ĉiuj lingvoj en unu volumon ne sukcesis. Neniu eldonejo volis preni sur sin tian taskon.

Por la sistema ordigo de la nocioj SIMON *et al.* (1990) proponis la uzadon de la Forsta Decimale-klasado, kiu vere valoras por enhavo de literaturo. Ĉiu nocio ricevas apartan t.n. FDCE-numeron, konsistantan el ok (pli malfrue el naŭ) ciferoj. Tio permesas aŭtomate ordigi la nociojn laŭ enhava parenco. Estis evoluigita la principa prezentado de la nocioartikoloj en la libro: per neta tripartigo en numeran kaplinion, en terminojn kaj en la difi-

non. En la *Index*-parto kun la alfabeto ordigitaj kapvortoj estis necese solvi la problemon de la traktado de plurvortaj terminoj. Ni decidis, ke sufiĉu por plurvorta termino maksimume tri kapvortoj.

La uzadon de la tildo kiel ripetsigno ni limigis al anstataŭigo de vortoj kun pli ol tri literoj, por ŝpari pressignojn kaj per tio paperon. Por la esperantlingva versio ni formulis "Glosaron" kun nove proponitaj vortradikoj. Dankinde profesoro Krause kontrolis la esperantlingvan version de la *prima pars*. Okaze de IUFRO-Konferenco ni organizis la unuan kunsidon "Terminologia laboro" en Ebersvaldo, kiu ebligis interŝanĝi spertojn sur tiu kampo. En 1993, dum la dua kunsido, s-ro Ullrich povis daŭrigi sian raporton pri la esploro de vortfarado ĉe kunmetitaj substantivaj terminoj. Ĉiuj prelegoj estis publikigitaj en "Forstista Informilo", intertempe komuna organo de IFRE kaj de "Patrona Asocio" (vd. sube).

Per kelkaj artikoloj ni raportis ankaŭ en fakrevuoj pri la estiĝanta verko. Por la registrado de la datenoj ni uzis kiel simplan datenbankon la WORKS-formon, kiu ne bezonas tro multe da storloko kaj ebligas lerni la aplikon de datena banko. Nun ni komencis transiri al la pli laborpova PARADOX-datenbanko.

1994 ni prezentis nian kolektitan materialon en elektronika formo sur diskedoj por la kunveno de la IUFRO-Workgroup S6.03 en Nancy / Francio. Montriĝis, ke la rapideco por akiro de la deziritaj vortoj sur diskedoj ne kontentigis la postulojn de tradukistoj. Tial estis planata la CD-ROM-formo. Proksimume je la fino de la pagita periodo fare de la Ebersvalda laboroficejo, la gefakuloj organizis Asocion de Publika Utilo, nomitan "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A.".

#### La sesa periodo kiel memstara jura persono ekde 1994

La Patrona Asocio povis aĉeti malmultekoste kelkajn jam uzitajn ilojn kaj meblojn kaj lui ĉambron en la Faka Altlernejo Eberswalde. Tie kvar gefakuloj nun daŭrigas senpage la vortaran laboron kiel senlaboruloj, sed kun severa gvido de la Direkcia Konsilio de la Asocio.

La "Ligo de Eŭropaj Forstistoj" (*Union of European Foresters*) invitis nin, prezenti *Lexicon silvestre* dum sia kongreso 1995 en Gdansk. Pro tio ni eldonis kvar lingvo-versiojn kiel apartajn volumojn. Tiu formo havas la avantaĝon por uzanto, ke ŝi/li nur bezonas aĉeti tiujn versiojn, kiun ŝi/li fakte uzas. Por la eldonisto estas la avantaĝo, ke oni ne bezonas atendi la liveradon de ĉiuj koncernaj lingvo-versioj.

La absoluta memstareco sen nomindaj enspezoj, sed kun konsiderindaj elspezoj por varbado, presado kaj bindado devigis nin post nia apero sur la merkato iom ŝanĝi nian labormetodon. Kvankam ni plenumas fundamentan esploron por la forstmastrumado kaj najbaraj branĉoj, niaj multnombraj



postuloj pri financa subteno estis vanaj. Ni do devas sekurigi la vendadon de niaj produktoj kaj per tio certigi minimumajn enspezojn. Ĉar efektiva protekto de niaj produktoj per jura protekto kostas tre altajn sumojn, ni devas protekti niajn produktojn per aliaj aranĝoj. Tio estas: unuflanke oferti la produktojn per malalta prezo, kiu faras nepermesitan kopiadon neatrakcia, kaj aliflanke rapide eldoni pliajn partojn kaj versiojn, kio re-tenis eblajn konkurencantojn, komenci mem tian laborintensan entre-preneon.

Akcelo de la eldono postulas plimallongigon de la produktadotempo. Niaj eblecoj fari tion per pli efektiva hard- kaj softvaro estas financaŭze tre limigitaj. Ekzistas la ebleco, malpliigi la nombron de la trarigardoj per kunlaborantoj; sed tio povus redukti la perfektecon de la produktoj. Samtempa redukto de la kvanto da ekzempleroj de unu eldono kaj pli rapida publikigo de plibonigitaj eldonoj estus imagebla solvo de la surkresta migrado inter elspezoj kaj enspezoj. Estas ankaŭ grave, ke ĉiam denove nia aŭtoraro ekscias per nova eldono sian kunagadvaloron. Ekde la jaro 1995 ni aperigis por la unuaj tri partoj de *Lexicon silvestre* sume 35 ISBN-Numerojn, por la "Prima pars" estas eldonitaj 10 lingvo-versioj, por la "Tertia pars" du versioj.

Per prelegoj ni konstante provas konatigi *Lexicon silvestre* kaj dume prilabori la kolektitajn spertojn. Tio estas realigata okaze de ĉiujara prelegaranĝoj "Forstfaka Terminologia Laboro" de la Patrona Asocio kaj *Gesellschaft für Interlingvistik (GIL)*, t.e. Asocio pri Interlingvistiko. Dum la duobla konferenco en Vieno okaze de la 100a datreveno de la naskiĝtago de *Eugen WÜSTER* ni povis internacie prezenti *Lexicon silvestre* al lingvis-toj. Kiel suplemento de nia *Lexicon silvestre* aperis nomenklaturato pri la forstfakaj plej gravaj lignecaj plantoj de Eŭropo kun scienc-latinaj, Espe-rantaj kaj germanaj nomoj (*Ullrich*, 1999).

### Konkluda kunmeto de praktikaj spertoj

- Alirebleco al literaturo kaj dispono pri komputoroj estas baza kondiĉo por terminologia laboro
- Terminologia laboro estu komuna verko de eble plej multaj kompententuloj de ia koncerna fako
- Koncerne Esperanton la prilaborota fako kaj la stato de la prilaborado en etnolingvoj kaj la nombro de uzantoj grave influas la acelotan rezulton de la terminologia laboro
- Terminologia laboro postulas interkonsiliĝon ankaŭ kun fakuloj de aliaj branĉoj
- Alianco kun aliaj organizoj kaj/aŭ institucioj ŝparas fortojn kaj rimedojn

- Aparta organizajo ampleksu la kernon kaj ĉefan parton de la kunlaborantaro
- Bibliografio pri bezonata literaturo estas helpa
- Oni uzu laŭeble normojn, speciale ISO-normojn
- Terminologia laboro en strikta senco eliras de nocioj kaj nociosistemoj
- Avantaĝa estas terminologia kurso kun praktika trejnado por komen-cantoj sur la terminologia kampo
- Avantaĝa estas sinsekvo de laborpaŝoj laŭ teorio, sed pripensita inter-plektado de la paŝoj povas ebligi pli rapide atingi rezultojn
- La sinsekvo de la prilaborotaj nocioj okazu laŭ la frekvenco kaj graveco de la nocioj
- Terminologia laboro bezonas oftan komunikadon inter la partoprenantoj
- Regula komunikado de la estraro kun la unuopaj kunlaborantaj kaj laŭdo pri iliaj prestoj konservas la motivigon
- Avantaĝa estas aparta komunikilo de la kunlaborantaro, kiu ebligas publi-kigi kaj jam frue praktike elprovi proponojn
- Regula raporto de la projektestro antaŭ la kunlaborantaro motivigas la lastan
- El literaturo aŭ el aliaj fontoj akiritaj informoj estu kiel eble plej kom-plete enmetitaj en datenbankon
- En la literaturo ekzistantaj eraraj sinonimoj por certa nocio estu indikitaj per konvenaj indikiloj por la uzantoj
- Specialajn literojn oni eventuale povas registri uzante kodon
- Difinoj estu koncizaj per utiligo de atentigiloj pri aliloke prilaboritaj kaj uzeblaj difinoj
- Ĉiu nocio estu sisteme klasifata, laŭeble per vaste konata sistemo
- Avantaĝa estas tia klasadsistemo de la nocioj, kiu ebligas por ĉiu nocio apartan numeron
- La kolektado de proponoj por norm-terminoj povas esti helpa
- Lingvaj decidoj pri proponitaj terminoj ne povas esti plenumataj per de-cido de plimulto, sed nur akorde kun la tuta sistemo de la fakterminoj kaj kun la sistemo de la respektiva lingvo
- Malgranda terminologia komisiono, kiu povas konsideri diversajn vid-punktojn, estas avantaĝa
- La norm-terminoj estu koncizaj
- Nura komunlingva regado de Esperanto sole ne sufiĉas por terminologia laboro, sed necesas pli profundaj konoj de la lingva strukturo de Esperanto

- Ĉe la propono de novaj Esperanto-radikoj oni estu retenema, sed ne timema
- Speciala "Glosaro", kvazaŭ aldono al PIV, klarigu novajn vortradikojn
- Avantaĝe estas, se Esperanto-lingvisto povas kontroli la rezulton de la terminologia laboro
- Helpa por pliaj ekkonoj pri terminoproponoj estas laŭeble plej frua elprovo de la terminoj ene de diversaj tekstoj
- Por plurlingvaj verkoj estas rekomendinde, uzi por la titolpaĝo kaj la registro de la kunlaborantoj la latinan kiel neŭtralan scienclingvon kaj por la sinsekvo de la lingvoj la koncernajn DK-indeks-numerojn
- En plurlingvaj verkoj oni povas interligi samajn nociojn per samaj nocinumeroj
- Estas grave, ke oni raportu en etnolingvaj fakrevuoj kaj fakkunvenoj pri Esperantlingva terminologia laboro
- Por etnolingva terminologia laboro esperantistoj povas esti kaj estu helpantoj
- Por intensivigo de terminologia laboro la formado de apartaj laborrondoj estas avantaĝa
- Por varbado kaj per tio disvastigo de rezultoj de la terminologia laboro, plue por ricevo de proponoj estas grave konstante fari prelegojn antaŭ grupoj da diversaj interesatoj.

### Resumo

En la jaro 1981 internacia grupo da forstistoj komencis terminologie prilabori la forstfakan lingvon por Esperanto kaj krei fundamentojn por prilaborado en etnolingvoj. Elirante de la konoj de terminologia scienco, la grupo akiris variajn praktikajn spertojn dum la pasintaj 18 jaroj. Tiuj spertoj estas prezentataj per historia skizo de la ĝisnuna laboro kaj estas konklude ĝeneraligataj por la utiligo fare de aliaj laborgrupoj.

*Summary: Experiences we gained in the field of treating the technical language related to forestry terminologically.*

*In 1981 we started to treat the technical language related to forestry in terms of terminology for Esperanto and to lay the foundations for treating ethnolanguages. Due to the knowledge acquired in the field of terminological science it has been possible to gain a great deal of practical experience during the last 18 years. We outline them in a historical survey and generalize them for the use by other teams.*

*Zusammenfassung: Erfahrungen auf dem Wege zur terminologischen Bearbeitung der forstlichen Fachsprache*

*1981 wurde begonnen, die forstliche Fachsprache für Esperanto terminologisch zu bearbeiten und Grundlagen für die Bearbeitung in den Ethnosprachen zu schaffen. Aufbauend auf den Er-*

*kennnissen der Terminologie-Wissenschaft, wurden in den vergangenen 18 Jahren vielfältige praktische Erfahrungen gesammelt. Sie werden in einem geschichtlichen Abriß dieser Arbeit dargestellt und abschließend zur Nutzung durch andere Arbeitsgruppen verallgemeinert.*

### Literaturo:

- DEHLER Wera*: 6 Tezoj pri terminologia laboro. *der esperantist* 18, Nr. 112(2/1982)
- FORD-ROBERTSON, F.C.*: *Terminology of Forest Science, Technology Practice and Products. Society of American Foresters. Washington DC. 1971*
- Forest Decimal Classification*, Vienna 1990, XIV, 147 p. (*IUFRO World Series 2*)
- Forstista Informilo de Internacia Forstista Rondo Esperantlingva kaj Patrona Asocio *Lexicon silvestre* "r.A., Eberswalde, Förderverein "Lexicon silvestre" e.V. ISSN 0949-9830, *English version* ISSN 0940-9741, *Version française* ISSN 0949-9822, *Deutsche Version* ISSN 0949-9733
- ISO 3166 Codes for the representation of names of countries. 3rd Edition 1988-08-15
- ISO/TC 37/5 N 53 Working Paper: Revised version of ISO 1087 "Vocabulary of Terminology"
- SIMON K.-H.* (eld.): *Lexicon silvestre*, Eberswalde, Förderverein "Lexicon silvestre" e.V., ISBN 3-931262-00-6
- SIMON, K.-H., ULLRICH, I., & PLUQUET, E.*: *Vorschlag zur Klassifizierung von Termini auf dem Gebiet des Forstwesens. Beitr.f.d.Forstwirtsch.* 24(1990)3, 146-147
- SUONUUTI Heidi*: *Guide to terminology. Nordterm 8, Teknikan Sanastokeskus, Helsinki 1997*, 36 p.
- SUONUUTI Heidi*: (Trad. *Sabine Fiedler*, Red. *Wera Blanke*): *Terminologia gvidilo. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1998*, 38 p.
- ULLRICH I.*: La forstarango en la Germana Demokratia Respubliko. 1984, 42 p. (skribmaŝine)
- ULLRICH I.*: Ĉefaj principoj por la fiksado de forstfakaj terminoj en Esperanto kaj la vidpunkto de libera vortfarado ĉe kunmetitaj substantivaj terminoj. *Forstista Informilo* (Eberswalde), 32(1995) Aldonaĵo 4
- ULLRICH I.*: Nomaro de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo (Scienc-latina, Esperanta, Germana). *Förderverein "Lexicon silvestre" e.V., Eberswalde 1999*, 174 p.
- WECK Johannes* (eld): *Wörterbuch der Forstwirtschaft, Deutsch, Englisch, Französisch, Spanisch, Russisch. Bayerischer Landwirtschaftsverlag München, Basel, Wien 1966*, 573 p.
- WERNER J.*: *Terminologia kurso. Roudnice n.L.; Esperanto-Asocio 1986*, 88 p.

### Aŭtoraj adresoj:

*Dr. Karl-Hermann SIMON*  
*Carl-von-Ossietzky-Str.21*  
*DE-16225 Eberswalde*  
 Germanio

*INGWARD ULLRICH*  
*Am Feldrain 11*  
*DE - 98646 Hildburghausen*  
 Germanio

### Priaŭtoro informo:

D-ro *SIMON* estras ekde 1981 la *Lexicon-silvestre*-projekton. S-ro *ULLRICH* estras ekde 1983 la Terminologian Komisionon (TK) de Internacia Forstista Rondo Esperantlingva (IFRE).